# *Kubo fabrikos cent milionojn da dozoj de sia vakcino Soberana 02 kontra? la Covid-19*




Havano, jan 21 (RHK) La ?enerala direktoro de la Instituto Finlay de Vakcinoj, Vicente Vérez Bencomo, anoncis dum gazetara konferenco kun la eksterlandaj gazetaroj akreditaj en Havano, ke Kubo kreas la kapacitojn por produkti cent milionojn da dozoj de la injektebla vakcino Soberena 02 kontra? la Covid-19.

Li ratifis ke la celo estas kontentigi la landajn bezonojn kaj anka? de aliaj landoj, kiuj volas akiri, ?is nun, la produkton, kiel Vjetnamio, Irano, Venezuelo, Pakistano kaj Barato. Kaze de nia lando, li klarigis, la vakcinaplikado estos senpaga kaj la celo estas imunizi la tutan lo?antaron.

"La strategio de Kubo komerci la vakcinon havas kombinon de humaneco kaj sekvo en la monda sano. Ni ne estas multnacia kompanio kun financa celo unualoke. Nia celo estas krei pli da sano", asertis Vérez Bencomo.

La klinika elprovo fazo II ampleksigita de la  vakcino Soberana 02 ekis ?i-semajne kaj inkluzivas 900 personojn inter 19 kaj 80 jaroj, dum oni faros novan elprovon februare kun infanoj, por ke ?i estu aplikebla al la infana lo?antaro.

Post la rezultoj en tiu ?i etapo, klarigis la direktoro de la instituto Finlay, oni transiros al la tria fazo. En tiu periodo la sanitaraj a?toritatuloj anta?vidas inkluzivi 150 000 personojn vundeblajn kaj rezidantojn en areoj altriskaj.

fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/245297-kubo-fabrikos-cent-milionojn-da-dozoj-de-sia-vakcino-soberana-02-kontrau-la-covid-19

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**